

Eŭropa Bulteno

Majo 2015, Numero 149

LA 3-a TUTMONDA KOLOKVO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO EN SVISLANDO



De la 13-a ĝis la 16-a de majo 2015 okazis en Neuchâtel (Svislando) la 3-a tutmonda kolokvo pri instruado de Esperanto. La kolokvon kiel daŭrigon de du unaj konferencoj okazintaj en praaj dudekaj jaroj de la 20-a jarcento organizis ILEI kaj la ĉefa loka organizantino estis la prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean. En la konferenco partoprenis nemultaj partoprenantoj, iom pli ol 50, tamen el dekkvino da landoj. Sed laŭ la kvalito la kolokvo povas fiere raporti por la postaj generacioj, ke en 2015 Esperanto disponis pri eksterordinara ilaro por instruado. Oni aŭdis ke pri retejo kia.edukado.net nuntempe ne disponas eĉ francaj lingvoinstruistoj, des malpli slovenaj aŭ kroataj, ke pri multlingva retejo por lerni Esperanton unuloke en kvardeko da lingvoj kia.lernu.net ankaŭ ne disponas aliaj naciaj lingvoj. Specialaĵo pri kiu disponas Esperanto estas akaŭ la ekzistanta studo pri la oftecormorfemaro, do laŭofteca listo de E-morfemoj kiu estas tre utila por scii kiujn morfemojn uzi laŭvice en lecionoj de la porkomencanta lernolibro, kion ankaŭ ne havas nacilingvaj lernolibroj, ĉar ne eblas krei morfemvortaron.

Sekve okazis prelegoj pri la tri menciitaj temoj (Katalin Kováts pri edukado.net kaj pri Eŭropkadrax ekzamenoj, Petro Baláž pri lernu.net kaj Zlatko Tišljár, pri morfemofteca studo. Kromajn eksterordinarajn atingojn prezentis en siaj prelegoj Zsófia Kóródy pri la praktikado lingva en arbara lernejo por ĝemelurboj Herzberg/Harz (Germanio) kaj Gora (Pollando), pri la Universitataj studoj por iĝi instruisto de Esperanto en universitato de Poznan (Ilona Koutny), pri lenolibro de Stano Marček en pli ol tridek lingvoj kun multaj aldonajoj por lernantoj kaj instruistoj, pri hungara ŝtata ekzamensistemo B1 por Esperanto (Kovács Márta) kaj pri tre specifa uzo de Esperanto en Freinet-metoda privata lernejo en La-Chaux-de-Fonds, kiun prezentis Monika Molnar. Tiuj sep prelegoj montris ke Esperanto-Movado nuntempe disponas pri rimedoj, instruistoj kaj institucioj kiuj avangarde antaŭeniras sur la kampo de instruado, oftfoje eĉ en grado de kiu nacilingvaj eduksistemoj povus multon lerni.



Krome ni aŭdis prelegojn pri temoj pli vastaj rilate Lernhelpan efikon de Esperanto (Mireille Grosjean), pri Esperanto kaj jarmilaj celoj de UN kaj UNESKO (Duncan Charters), pri Esperanto kaj EU (István Ertl), pri instruilo por Afrikanoj de Monique Arnaud kaj pri fremdlinga instruado en Svislando (Dietrich M. Weidmann). Dum la solena malfermo parolis tre inspire Mireille Grosjean pri la preparoj de la konferenco

kaj parolis kelkaj politikaj gravuloj de la kantono kaj la urboj Neuchâtel kaj La-Chaux-de-Fonds.

La lastan tagon la partoprenantoj pasigis en nefora urbo La-Chaux-de-Fonds en la ŝtata biblioteko ene de kiu esperanistoj disponas pri CDELI (Centro por Dokumentado, edukado kaj Internaciaj Lingvoj), kiun gvidas Claude Gacond. Tie okazis tri sesioj, trarigardo de CDELI, diskuto pri perspektivoj de ILEI kaj diskuto pri strategio de Esperanto kun fina konkluda kunsido. Pluraj eksterlandanoj fine vizitis la Freinet-lernejon en kiu instruas Monika Molnar du infangrupojn kie parto de la instruado okazas en Esperanto.

Mia baza impresio estas ke Esperanto ne nur en la kampo de edukado havas eksterordinarajn rezultojn kaj montreblajn produktojn al eksteruloj, sed ke ĉion kreis eksterordinaraj unuopuloj. En la E-movado ŝajne apenaŭ ekzistas io serioza kion kreis kolektivo aŭ celdirektita grupo. Ĉio prezentita en la prelegoj de la kolokvo, kiel dirite, estas mirindaĵoj kaj des pli grandaj mirindaĵoj pro tio ke ilin kreis tre esceptaj personoj. Tio montras la forton de E-komunumo kiu donas kreenerĝion al talentuloj, sed ankaŭ ke en ĝi ne sukcesas kreski kolektivaj produktoj. Grandioze kaj zorgige.

Zlatko Tišljár

ESPERANTLINGVAJ ELEKTOAFIŜOJ EN BARCELONO



Unu el la ĉefaj kandidatoj por la urbestra posteno en Barcelono uzas Esperanton en sia elektokampanjo. Ŝiaj multlingvaj reklamafiŝoj montras sloganojn kiel “Ili volas nin solaj – ili vidos nin kunaj” kaj “La demokratia revolucio apartenas al ĉiuj”.

La bildo en ĉi tiu artikolo montras umu el balotafiŝoj, nun videblaj en la stratoj de Barcelono. La vizaĝo estas tiu de politikistino kiu havas realajn ŝancojn fariĝi urbestro de Barcelono post la municipaj balotoj dimanĉon 24-an de majo. Ŝi nomiĝas Ada Colau (elp. Kolaŭ’) kaj la listo per kiu ŝi kandidatas nomiĝas “Barcelona en Comú” (mallonge BeC), esperantigebla per, proksimume, “Barcelono kune”.

En la balotoj ŝia platformo gajnis plej multajn voĉojn, sed nun ŝi devas trovi koaliciantajn partiojn por esti elektita urbestro. La interdiskutoj daŭras.

Antonio del Barrio

FINA RAPORTO DE LINGVO.INFO

Kiel jam raportite en antaŭaj numeroj de la Eŭropa Bulteno, la projekto lingvo.info oficiale finiĝis la 30-an de novembro 2014. Tio signifas ke je tiu dato ĉiuj rezultoj de la projekto promesitaj en la monpeto devis esti plenumitaj kaj ne plu eblis de la projekta buĝeto elspezi monon. Tamen restis ellabori la finan raporton, kiun EEU preparis dum la sekvaj du monatoj kaj forsendis la 31-an de januaro 2015. La fina raporto enhavis pli ol 1600 unuopajn dosierojn kaj entute 1 GB da datumoj. La plej granda parto inter ili estis financaj datumoj - supozeble pli ol 1000 unuopaj kvitancoj, fakturoj kaj aliaj financaj pruviloj. Necesis unu monato da preskaŭ tagnokta senpaŭza laboro por kontroli la financajn raportojn kaj pruvilojn de ĉiuj naŭ projektpartneroj. Krome dume necesis verki la finan enhavan raporton kiu konsistas el du partoj: proksimume dudekpaĝa publika parto kaj 60-paĝa konfidenca parto. Aldone pluraj internaj raportoj pri testado de la paĝaro kaj ludo, interna valorigo de la projekto ktp. Necesis kolekti ĉiujn dokumentojn kaj produktojn faritajn dum la projekto kaj aranĝi ilin tiel ke la taksantoj povu kontroli ke ĉio estis farita kiel planite en la monpeto. Devis enesti ĉiuj lingvaj versioj de ĉiu dokumento, informilo, ĵurnalista komuniko kaj simile. En tiu laboro multege helpis la partneroj Studio Gaus el Germanio kaj Asocio por eŭropa konscio el Slovenio. Kiam la publika raporto estos publikigita en la paĝaro de EACEA, ni informos en la Eŭropa Bulteno, sed tio povus esti eĉ nur post unu jaro.

Februare, jam unu semajnon post alveno de la raporto al la agentejo en Bruselo, alvenis pluraj

paĝaj proverbolibretoj. Krome estis produktita reklamfilmeto por Youtube.

- Dum la projekto la paĝaron vizitis ĉirkaŭ 70.000 uzantoj. Intertempe jam estis pli ol 143.000 vizitantoj.

- lingvo.info Facebook paĝo havas jam pli ol 7.700 ŝatojn.

- Ni taksas ke en la reto estas pli ol 10.000 mencioj de la paĝaro. Inter publikaĵoj pri la projekto troveblas artikoloj publikigitaj de kroata, litova kaj slovena presagentejoj kaj grandegaj portaloj kaj gazetoj kiel la pola Gazeta Wyborcza, Germanaj novaĵportaloj Yahoo Germanio kaj focus.de. Informoj pri la paĝaro aperis ankaŭ en pluraj naciaj televidkanaloj en malpli grandaj landoj kiel Danio, Kroatio k.a.

En la fina raporto estas taksitaj entute sep flankoj de la projekto: celoj, rezultoj kaj produktoj; kohereco inter la planoj kaj raportita projektlaboro; partnereco; projektmastrumado; financa mastrumado; valorigo kaj kvalitkontrolado kaj laste dissemado. Ĉiuj sep flankoj de la projekto estis taksitaj bonaj aŭ tre bonaj kaj fakte neniuj gravaj kritikoj estas troveblaj en la fina projektakso. La projektoj estas taksataj de eksteraj spertuloj kiuj estis elektitaj el ĉiuj EU landoj kaj kiuj ne estas dungitaj de la institucioj de EU. Ĉar traduko de la tuta 3-paĝa takso verkita de la ekstera spertulo de EACEA prenis tro da spaco, jen la traduko de mallonga fina resumo de la takso:

Resumo de komentoj:

La celo de la projekto lingvo.info estis kreado de multlingva paĝaro kiu ofertas informojn pri eŭropaj lingvoj. La paĝaro kaj la lingva ludo estas kunmetitaj tre altkvalite kaj ili konsistas el kelkaj partoj kun malsama enhavo kaj fokusiĝo.

Ĉiuj taskoj de la projekto estis 100% plenumitaj, eĉ plia laboro kaj klopodoj estas klare videblaj. Pli da lingversioj estis preparitaj ol unue planite. La disvastigo de la projekto estis speciale bonege realigita. La paĝaro lingvo.info mem, rilataj Facebook kaj Twitter novaĵoj, kaj multaj kromaj disvastigaj aktivecoj donis al la projekto grandan kvanton da finaj uzantoj kaj sekvantoj.



Fortaj flankoj de la projekto:

- Altkvalitaj konkretaj rezultoj
 - La paĝaro lingvo.info estas aparte alloga kaj facila por uzantoj
 - La projekto jam havis tre grandan kvanton de uzantoj - 70.000 ĝis nun
 - Disvastigo de la projekto estis realigita aparte bonege
 - La projekto havas klarajn ideojn kiel certigi la daŭropovon de la rezulto
- Malfortaj flankoj de la projekto:
Neniuj.

Dankon al la tuta projektteamo!

Maja Tišljarić

PRELEGO PRI MULTLINGVECO EN EŬROPO




Je la 19a de majo okazis en la "Maison de la Francité" Bruselo franclingva prelego kaj diskuto pri la temo "Multlingveco en Eŭropo: ekonomia neceso kaj sociaj defioj". Organizis ĝin la organizo "GEM+" (GEM + - pour une Gouvernance Européenne Multilingue, ASBL), fondita en pasinta decembro, kaj prelegis la emeritiĝinta profesoro Claude Truchot de la Universitato de Strasburgo.

Li prezentis laŭ li eraran kredon de iuj politikistoj ke "internacie ĉio okazas en la angla" kaj kontraŭargumentis per aro da ekzemploj el (ĉefe sed ne nur francaj) entreprenoj, kie tia angliga aliro - ĉu post transpreniĝo fare de alilanda entrepreno, ĉu post grandigo alilanden - malsukcesis ne nur ĉe klientoj, sed ankaŭ ĉe la propraj dungitoj kiuj pro deviga lingvoŝanĝo montriĝis pli streĉitaj kaj malpli povis uzi siajn profesiajn kapablojn. Li fine advokatis por adapto de la firmaa softvaro al la lingvo de la dungitoj, por eluzi la "konsiderindajn lingvaj rimedojn" de siaj dungitoj kaj uzi la anglan "racie kaj proporcie". Poste dum la diskuto (kiu malgraŭ teoria ebleco uzi ĉiujn kvar asociajn lingvojn okazis same nur en la franca) la publiko interesiĝis i.a. pri la "nevidebla" socia kosto de la lingva faktoro, la uzo de lingvo(j) en la eŭropuniaj institucioj kaj eblaj lingvaj sekvoj de ĉu-forlaso de EU fare de Britio, sed ankaŭ nomis pliajn ekzemplojn de transnaciaj firmaoj kaj ties lingvouzo. Malgraŭ la forta akcento specife je Francio kaj la franca, ĉi-aranĝo montriĝis interesa kaj inda. Pliaj similtaj aranĝoj estas jam planataj, interalie unu en la venonta aŭtuno.

Sandra Schweder

EKSTERORDA NUMERO DE KROATIA SCIENCA REVUO INDECS DEDIĈITA AL ESPERANTO



Dum la Universala Kongreso en Lillo oni solene lanĉos eksterordan numeron de la kroata scienca revuo INDECS (Interdisciplinary Description of Complex Systems), kiu ĉi-jare estis dediĉita al Esperanto. Tiun ĉi revuon finansas Ministerio de sciencoj, edukado kaj sportoj de Respubliko Kroatio. La ĉefredaktoro estas Josip Stepanić. La eksterordan numeron iniciatis Veronika Poor kaj kunmetis Humphrey Tonkin. En la numero aperos du artikoloj de Detlev Blanke (unu kunlbore kun Wera Blanke), kaj po unu de Ilona Koutny, Sandra Fiedler, Duncan Charters, S. Konishi kaj Krunoslav Puškar.

Tiun ĉi apartan numeron de INDECS pri Esperanto ni dankas al la restado de juna hungara sciencistino Veronika Poor dum la

Kunveno de Esperantaj Verkistoj kaj tradukistoj pasintjare en Koratio. Post la renkontiĝo ŝi restis en Kroatio kiel gasto de prezidanto de Kroatia E-Junularo Ďivo Pulitika. En Zagrebo ŝi amikis kun junaj sciencistoj kroataj kiuj surpriziĝis ke Esperanto ankoraŭ ekzistas kaj funkcias. Interesita pri ŝia rakonto pri la internacia lingvo, la redaktoro de la revuo ofertis al ŝi ke en unu numero prezentu science Esperanto. Veronika petis la helpon de Humphrey Tonkin kiu invitis esperantistajn sciencistojn al kunlaboro. La rezulton ni baldaŭ havos enpaĝigitan en eksterorda numero de INDECS.

Spomenka Ŝtimec

STRATEGIAJ ELEMENTOJ POR LA ESPERANTO-MOVADO BAZE DE FLAT-ANALIZO

En la pasintaj kvar numeroj de EB mi ellaboris FLAT-analizon de la E-movado kaj baze de ĝi mi provas ĉi tie prezenti la ĉefajn strategiajn vojojn kiujn la movado ekmarŝu por plisukcesigi siajn atingojn.

1. Konsiderante la ĉefan avantaĝon eksteran: la interreton kaj la internajn avantaĝojn: la facilecon de komenca fazo de Esperanto kaj ekziston de programistoj-esperantistoj, konkludiĝas ke ni devus ellabori specialan retan kurson por memlernantoj baze de maksimume 100 plej oftaj morfemoj (proksimume 2-3 lecionoj laŭ la Zagreba lernolibro) kiu ebligas rapidegan memlernadon kaj multajn ekzercojn por krei frazojn kaj ludi per la akiritaj konoj. Tia mallonga kurso scivoligus multajn ĉefe junajn personojn eklerni kaj ludi. Post kiam ili sufiĉe longe uzos nur tiun lingvan nivelon kaj baze de ĝi kapablos bone manipuli la lingvon, multaj el ili verŝajne volos daŭrigi kaj atingi pliajn nivelojn. Por ili necesos krei daŭrigan lernadon ĝis la nivelo de 500 plej oftaj morfemoj kombinate tiun kurson kun tujaj babilejoj kaj praktikadoj kun aliaj lernantoj kaj fine kombine kun vivaj daŭrigaj kursoj en aranĝoj kia Somera E-Studado.
2. Konsiderante la eksteran avantaĝon ke EU-fondaĵoj pretas financi projektojn kiujn prezentas E-organizoj, oni maksimume stimulu ĉujn E-organizaĵojn kun profesiaj esperantistoj kaj ankaŭ esperantistojn en instruinstytucioj (lernejoj, universitatoj, lernejoj por plenkreskuloj...) mem lerni kiel ellabori projektojn kaj serĉi partnerojn por ricevi monon kaj realigi laŭeble multajn projektojn. Per tio oni gajnas profiton el kiu eblas parte financi poresperantajn programojn kaj reputacion ekstermovadan. La movado komencu organizi seminariojn pri tio kiel krei sukcesajn projektojn por ricevi financojn de EU-fondaĵoj.
3. Baze de la fakto ke EU serĉas solvojn por sia lingva problemo kaj ke inter potenculoj en EU (altrangaj politikistoj, sciencistoj, ekleziaj gvidantoj) troviĝas bonvolaj simpatiantoj por Esperanto, la E-instituicioj (antaŭ ĉio EEU kaj landaj Asocioj en EU) serĉu niĉojn je socipolitika kampo por sukcesigi Esperanton akiri pli oficialan pozicion en EU. Montriĝis ke Pollando sukcesis akiri oficialan statuson de nacia kulturheredaĵo por Esperanto kaj ke Hungario sukcesis akiri leĝon laŭ kiu diplomigintoj en Universitatoj povas havi utilon de la scio de Esperanto kaj ke EEU sukcesis akiri statuson de membro en Platformo de

nereigstaraj organizoj por multlingvismo kiun starigis Eŭropa Komisiono. Baze de tio oni povas starti per:

- Stimuli landajn asociojn en EU postuli same kiel polaj esperantistoj en sian landoj ke oni akceptu oficialan statuson ke Esperanto kiel nacia kultura heredaĵo (ekz. en ĉiu lando oni konsideras la verkistojn kiuj siatempe en la antaŭaj jarcentoj verkis en la latina, ankaŭ parto de la kultura heredaĵo de tiu lando/popolo kaj ĉar Esperanto havas fortan kulturalan historion jam pli ol 100 jarojn en la plimulto de eŭropaj ŝtatoj, oni petu pri tiu statuso).
 - Baze de la atingiĝo en Hungario oni klopodu postuli similan statuson de Esperanto, tie kie por tio ekzistas kondiĉoj – ekzemple en Francio.
 - Oni serĉu baze de la akiraĵo en Platformo pri multlingvismo niĉojn pri similaj ŝancoj kie ajn en oficiala politika funkciado de EU. Ekz. en Slovakio oni fondis Tutpopolan platformon pri antaŭenigo de EU en tiu lando kaj tie la esperantistoj klopodu aktivi kaj proponi poziciojn por Esperanto. En Italio Universitato jam prilaboras projekton pri lerneja lernprogramo cele al edukado de eŭropa junularo por eŭropaj komuneco kaj valoroj. Tie esperantistoj devus nepre kunlabori kaj proponi partojn de la lernobjektoj inter kiuj estus enkonduko de baza Esperanto ktp. Eble oni povus atingi akcepton far decidantoj eksperimente organizi unu el Euroscola-oj en Strasburgo en Esperanto k.s.
4. Konsiderante la avantaĝojn de interreto en kiu nun eblas influi milionojn da homoj kaj la fakton ke esperantistoj jam uzas ĝin tre originale diversmaniere, oni komencu prepari nian novtipan organiziĝon modernan kaj avangardan. Adapti la movadon al nova realo:
- Reklami Esperanton laŭ eblecoj kiujn disponigas la sociaj retoj (iu komisiono de fakuloj ellaboru la taskaron por atingi tion)
 - Krei virtualajn lernejojn kaj ekzercejojn kombinante ilin kun vivaj renkontiĝoj kadre se someraj E-studadoj (lige al punkto 1)
 - Organizati diversajn retojn laŭ la interesoj de la homoj kaj malfermi ilin stimulantante ke ĉiu interesgrupo (kiu ne okupiĝas nur pri internaj esperantaĵoj) estu dulingva tiel ke povu kunlabori ne nur esperantistoj. La dulingveco estu Esperanto kaj nacia lingvo de la retestro kaj se eble ankaŭ la angla. La dulingvismo aŭ trilingvismo grave malfermas nin al la mondo kaj uzante la anglan, ni fakte uzas la strategion de partizana milito: uzu la armilojn ŝtelitajn de la malamikoj. Eble en baldaŭa estonto en tio povus helpi fakuloj esperantistaj kiuj okupiĝas pri aŭtomata tradukado (ekz. en WikiTrans) ebligita aŭtomatan sufiĉe kvalitan tradukadon el Esperanto al la angla.

Zlatko Tišljarić

LA 92-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN HAMELEONO



La Esperanto-grupo "Ratkaptista Bando" el Hameln invitis al la ĉi-jara Esperanto-kongreso.

Kune kun unutagaj gastoj aperis ĉ. 200 Esperanto-parolantoj en la belega turisma urbo Hameln. Tio estas vera rekordnombro dum la lastaj jaroj. La kongreso mem okazis en profesia mezlernejo en la mezo de la historia urbocentro. Unue urbestro Claudio Griese akceptis ĉ. 50 personojn (unuavice aktivulojn kaj eksterlandajn gastojn) kaj la iaman urbestron de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, sinjoron Gerhard

Walter, en la bela kaj historia Geedziĝodomo de Hameln. Li vere ĝojis pri la Esperanto-ideo kaj pri la multnombraj eksterlandaj kongresanoj. La urbo ĉe la Weser-rivero estas aparte bela kaj en la urbocentro oni trovas multajn historiajn domojn, grandparte laŭ la stilo de "Weser-renesanco".

La kantduopo "Ĵele" donis kulturalan kadron al la inaŭgura ceremonio, dum kiu okazis multaj salutprezentadoj, ekz. ankaŭ de sinjoro Lutz Peters, urbestro de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Tre interesan festprelegon aŭdis la publiko de la invitita oficiala urba 'ratkaptisto', kiu per kantado, muziko, projekciado ilustris la legendon de la ratkaptisto kaj klarigis, kiel la urbo fariĝis tutmonde konata pere de tiu iama historio.

Dum la kongreso okazis muzikprezentadoj far la ĉiam altnivele ludanta grupo Asorti, la konata gitaristo kaj kantisto JOMO el Francio kaj la nova elstara muzikisto Kaŝi el Hamburgo. Ili instigis multajn kongresanojn al komuna dancado. La talenta pentristino Helga Plötner el Gräfenhainichen starigis ekspozicion el siaj propraj verkoj, impresis ŝiaj portretoj pri famaj nuntempaj Esperanto-aktivuloj. Dum la kongreso okazis multaj Esperanto-fakkunsidoj, ekzemple de la instruistoj, fervojistoj, junularo, landa ligo de Malsupra Saksio, seminario pri verkado de gazetartikoloj, ktp. Entute estis vigla kongreso kun bona etoso. Tri libroservoj zorgis pri la ofertado de multaj esperantlingvaj libroj.

Kompreneble okazis ankaŭ la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio. Ĉi-jare temis pri aparte komplika kaj longdaŭra proceduro, inter aliaj pro la nova GEA-oficejo en Berlino. La membraro reelektis Sebastian Kirf el Emden kiel prezidanton. Andreas Emmerich denove fariĝis vicprezidanto. Al la nova GEA-estraro apartenas ses pluaj geestraroj.

Je pentekosta dimanĉo kaj pentekosta lundo okazis ekskursoj, ekzemple al la belega Hämelschen Kastelo kaj al la proksima "Schillat-minejo". Gratulinda iniciato estis la ekspozicio el modernaj kaj koloraj Esperanto-libroj kun aldonaj esperantaĵoj en la montrofeneŝtro de urbocentra librovendejo. Ankaŭ la surstrata informbudo bone taŭgis por publika varbado. Laŭdindan laboron faris la LKK sub la gvido de la gaja kaj senlaca Esperanto-aktivulo Heinz Sprick. Ĉiuj ŝuldas dankon al la bona LKK-teamo.

Zsófia Kóródy

TUTSLOVAKA ESPERANTO-RENKONTIĜO 2015

La Slovaka Esperanto-Junularo (SKEJ) organizis en Modra-Harmónia inter la 22-a kaj 24-a de majo 2015 la Tutslovakian Esperanto-Renkontiĝon (TER) 2015. La estraro de SKEJ, kiu unuan fojon organizis tutslovakian renkontiĝon, preparis por kvardeko da partoprenantoj interesan kaj amuzan programon. Dum la aranĝo okazis prelegoj, diskutoj, raportoj, kunsidoj de grupoj, organizoj kaj muzeo-vizito, sed ankaŭ vingustumado, kantado kaj dancado.



La ĉeftemo de la ĉijara TER estis dediĉita al du slovakaj personecoj, al la 200-a datreveno de naskiĝo de Ludovít Štúr, kiu estis kodiganto de la aktuala literatura formo de la slovakaj lingvo „Štúr konata kaj nekonata“ kaj Albert Škarvan, kiu eldonis en 1907 la unuan lernolibron de Esperanto „Škarvan – prapatro de la slovakaj E-movado“.

Krom la interesaj prelegoj kaj informoj, partoprenantoj multe diskutis pri preparado de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra en julio 2016. Antaŭ la komenco de TER okazis la 2-a kunsido de la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la Slovaka Esperanto-Federacio (SKEF) de la 101-a UK, kiun gvidis Peter Baláž, prezidanto de LKK. Li informis, ke la delegacio de LKK de 101-a UK raportis al la estraro de UEA en Roterdamo la 26-an de aprilo 2015 pri preparado de la 101-a UK en Nitra. SKEF intencas doni akcenton al malfermigado de la Esperanto movado al la ekstera mondo laŭ la Strategia Laborplano de UEA aprobita dum la UK en Rejkjaviko en 2013. SKEF volas utiligi la fakton, ke en la 2-a duonjaro de 2016 Slovakio prezidos en la Konsilio de EU kaj preparas malfermitan UK-on en Nitra. La UK okazos sub aŭspicio de Andrej Kiska, prezidento de Slovakio. La Slovaka Poŝto eldonos okaze la 101-a UK en Nitra la unuan esperantan poŝtmarkon. Krom la programo de UK samtempe okazos tri malfermitaj akompanaj aranĝoj, en kiuj partoprenos ankaŭ neesperantistaj fakuloj kaj reprezentantoj de civitanaj organizoj.

Temas pri „Lingvo-politika konferenco de landoj V4+ pri lingva politiko en EU“ (V4 – Ĉeĥio, Hungario, Pollando, Slovakio plus samopiniantaj landoj de EU) en kiu partoprenos politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj; „Internacia Entreprenista kaj Komerca Forumo“ kaj „Interreligia Kunveno“ de reprezentantoj de mondaj religioj, por subteni interreligian dialogon kaj interkompreniĝon.

Jozef Reinart

Sekretario de LKK de 101-a UK por eksterlandaj, diplomataj kaj fakaj rilatoj

GRUNDTVIG-FINSEMINARIO EN HERZBERG AM HARZ

De aŭtuno 2013 ĝis julio 2015 daŭras la Grundtvig-projekto „Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo – kiel lerni pri ili?“. La eŭropaj programoj kun la nomo Grundtvig nun ne plu ekzistas, de 2014 Eŭropa Unio enkondukis novan unuecan eŭropan klerigsubvenciosistemon kun la nomo „Erasmus +“.

La partneroj de nia komuna projekto estas

- Centro de Interkultura Edukado (CIE, Nowy Sacz, Pollando)
- Germana Esperanto-Centro - Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo (ICH/GEC, Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio)
- Kultura Esperanto-Asocio (KEA, Budapeŝto, Hungario)
- 'Fondaĵo' edukado.net (Den Haag, Nederlando)

En januaro 2014 tri eksterlandaj delegacioj vizitis la partneron en la Beskidoj (Pollando). Tie oni prezentis naciajn dancojn, historiajn muzeojn pri iamaj koloniistoj, prezentis la tradicion katolikan postkristnaskan feston „Kolenda“ en diversaj privataj domoj. Okazis multaj klarigoj kaj oni respondis tuj la demandojn de la partnergrupoj.



En printempo la nederlanda partnero invitis al la belaspekta historia urbo Sneek en Frislando. Tie ni spektis tradicion frisan feston, vizitis muzeon pri frisa kulturhistorio, historian vilaĝon kun dulingvaj ŝildoj (frisa kaj nederlanda). Vespere ni rigardis tradiciajn frislandajn dancojn kaj ni eĉ povis kundanci. Fakprelegoj riĉigis la programon, ekzemple pri la frisa lingvo.

En aŭtuno 2014 kadre de Grundtvig-seminario ni povis esplori hungarajn tradiciojn. Okazis prelegoj, prezentado de popoldancoj, koncerto de violonmuzikistoj. Ni vizitis ankaŭ historiajn kaj folklorajn muzeojn. Kompreneble ankaŭ la vizitado de tipa vinproduktejo apartenis al la klerigprogramo. Okazis multaj diskutoj. Ni povis kompari la diversajn naciajn respektive regionajn kulturformojn. Ĉion ni dokumentis per multaj fotoserioj kaj filmoj. Inter la partneraj renkontiĝoj okazis retkonferencoj pri planado, kunordigo de taskoj por plenumi la seminariajn celojn.

Kiel lasta klerigstacio Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo dum Pentekosto (je fino de majo 2015) troviĝis sur la speciala klerigitinero. El ĉiuj partnerlandoj venis delegacioj, aparte grandnombra el Pollando. La folkloro grupo de la Harz-Klubo el la najbara vilaĝo Pöhlde prezentis tradiciajn dancojn kaj ofertis popolkantojn el la Harz-regiono. La muzikgrupo „Siebertaler“ (Sieber-valanoj) belege kantis kaj ili prezentis unikan belsonan koncerton. Unu virino el la muzikgrupo ravis per sia belsona jodlado (tradicia kantstilo en mezeŭropaj montaroj). En la grupo estis ankaŭ du vipistoj, kiuj majstre uzis siajn vipojn kiel

muzikinstrumentojn. Tio devenis el la tempo de antaŭ pli ol cent jaroj, ĉar tiutempe la lignaĵĉaristoj sur la mallarĝaj Harz-vojoj (ekzemple antaŭ kurbiĝoj) devis signali (komuniki) per specialaj vipbatoj. Junaj polaj kantistinoj, juna kantisto el Kubo kaj la konata Esperanto-gitaristo JOMO el Francio per internacia muzikrepertuaro gajigis la homojn dum la publikaj koncertoj kaj en la granda salono de la restoracio Domenico en Herzberg kaj en la hotelo „Zum Pass“ en Herzberg-Sieber. Multaj homoj el la regiono ĉeestis por rigardi la kulturspektaklojn, ĉar laŭ la Grundtvig-programo la tiel nomata publika dissemado estas grava elemento por sukcesaj projektoj. Zsófia Korody kaj Peter Zilvar preparis prezentadon de konataj legendoj el Herzberg am Harz kaj la regiono, la projektpartneroj komune priparolis la tutan projektsinsekvon por akordigi laboron por projektproduktoj kaj por la Grundtvig-



finraporto. Dank' al la bona kunordiga laboro de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg la diversnaciaj partoprenantoj povis partopreni en la speciale grava evento kaj kunmarŝi en la kelkcentjara tradicia popolkaj pafista festo kunportante naciajn, eŭropajn kaj Esperanto-flagojn. Miloj da homoj el la tuta regiono staris ĉe la stratrandoj en la urbocentro kaj rigardis la

festecan kaj varian marŝparadon.

Je la fino de la sukcesa dujara EU-projekto okazis - kune kun ĉiuj projektpartneroj - oficiala akcepto en la urbodomo en Herzberg am Harz... la Esperanto-urbo ĉe urbestro Lutz Peters. Li ankaŭ en Esperanto salutis la projekt-delegitojn kaj la ĉeestantajjn alilandajn vizitantojn, kiuj taŭge informis lin pri la vasta uzeblo de nia internacia lingvo. Li gratulis al la projektpartneroj pro la sukcesa kunlaborado kaj deziris pluajn komunajn eŭroponivelajn klerigprojektojn. La kelktaga programo enhavis ankaŭ ekskurson al la historia urbeto Duderstadt, vizitadon de la Esperanto-muzeo kaj gvidadon en la kastelo de Herzberg, fotadon ĉe la Zamenhof-monumento, plurajn komunajn manĝojn, kantadon, dancadon, agrablan festadon en multnacia, multkultura amika rondo.

Zsófia Kóródy

74-A HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

La 74a Hispana Esperanto-Kongreso okazis de la 1a ĝis la 3a de majo 2015 en la Kulturdomo de Kujero (Cullera), urbeto el la subŝtato Valencilando. Ĉi-kongreso, netradicie mallonga, estis organizita de kuraĝa junulo, Enric Baltasar, kun ioma helpo de la lokaj E-asocioj, kaj ĝin partoprenis 90 esperantistoj, t.e. preskaŭ la duono de la antaŭa kongreso en Ronda. Malgraŭ ĉi-fakto, oni povas epiteti la kongreson sukcesa, el etosa vidpunkto, kvankam ne aparte brila, laŭ mia gusto. La aranĝon buntigis per sia ĉeesto, kaj eĉ aktiva partopreno, samideanoj el Suda Koreio, Ĉinio, Vietnamio, Usono, Germanio, Francio, Rusio kaj Finnio. Pluraj programeroj menciindas. Tonyo del Barrio, prezidanto de HEF, prelegis pri "Donkiĥoto kaj

Esperanto". Krome, li prezentis kelkajn el la projektoj de HEF pri la kunmemoro, dum 2015, de la 400a datreveno de la publikigo de la dua parto de "Donkiĥoto el Manĉo". Inter tiuj projektoj, elstaras la jam disvolviĝanta bitigo kaj posta enretigo de la universala verko de Cervanto. Javier Romero Tello paroladis pri "Nova monda kulturo kaj Esperanto", kun referenco al la libro "Martinus kaj la nova monda kulturo" de Ole Therkelsen. Apartan intereson estigis la prelego de Ana Manero pri la Bitoteko de HEF, sendube grava movada entrepreno ligita al biblioteka agado kaj al retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo. "Kiel fari kanton" estis la ateliero propono de Liven Dek, kiu en malpli ol duonhoro sukcesis laborigi la partoprenantojn tiel ke ili faris la unuan parton de kanto. Krome, Flama (Nguyễn Thị Phương) faris amuzan prezenton de sia lando Vjetnamio. Ŝi, same kiel la nuntempa prezidanto de la junulara asocio HEJS, Alex Escomu, aktive rolis en distraj programeroj.



Pozitiva estis la afabla sinteno de la urba skabeno pri kulturo María Carmen Tormos, kiu partoprenis la inaŭguron kaj ricevis sortimenton da libroj donace por la loka biblioteko. Ĉarma estis la komuna kolazono, okazinta en la vendreda interkona vespero, precipe ĉar ĝi konsistis el plej diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la kongresanoj mem el siaj devenregionoj. Plezuriga estis la ekskursiva promeno laŭ bela monta promenejo (nome, vojo Kalvario) al monto, sur kies supro staras la kastelo, kiu superregas la urbon, la valon de la rivero Júcar, kaj la apudan plaĝon. Sur tiu privilegia loko okazis surprize interesa prelego pri suna astronomio fare de Vicent Lluís Gimeno. Kompreneble, ne mankis la kunsido de HEF; koncerto, ĉi-okaze fare de Jonny M, kies disko "Regsteilo" estas eldonita de Vinilkosmo; ekskurso al la ĉefurbo Valencio, kaj komuna vespermanĝo en kiu la ĉefa plado estis la tipe valencia "paelo". Fine, mi menciui ke la kongresanaro, kaj la ĝenerala publiko, povis spekti, en la enirhalo de la kulturdomo, eksponadon de tutmondaj poŝtkartoj, koresponde uzitaj de esperantistoj kaj kolektitaj antaŭ unu jarcento. Kaj laste, sed ne balaste, ni diru ke la 30-grada temperaturo invitis al ĝuado de la granda, bone prizorgata plaĝo de Kujero. Se vi volas spekti diversajn filmitojn pri tiu kongreso vizitu la jutuban kanalon de HEF: www.youtube.com/user/esesperanto.

María Zocato

67-a KONGRESO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO, RUSE AŬ ESPERANTISTA KONGRESO KIE LINGVO ESPERANTO NE ESTIS UZATA

Inter rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj ĉiame estis bona kunlaboro. En la kongreso de 1910 en Sofio, kiun ĉeestis multaj rumanaj samideanoj, oni decidis unuigi la du naciajn Esperanto-gazetojn “Lumo” kaj “Rumana Esperantisto”, kreiĝis komuna gazeto “Danubo”, redaktita de miksita dunacia komitato kaj presata en Bukureŝto. En la bulgaraj Esperanto-kongresoj partoprenis rumanaj samideanoj kaj en rumanaj Esperanto-kongresoj ĉeestis bulgaraj. Dum la komunisma periodo, kiam en Rumanio estis malpermesita esperantista agado, bulgaraj samideanoj el Ruse kaj Kubrat alportis esperantaĵojn por rumanaj esperantistoj. Esperantista movado en Bulgario estis helpata de bulgara registaro. Bulgario estis sola lando kiu havis Internacian Esperanto- Kursejon en Pisanica (montara regiono) kaj ĉe Nigra Maro (Varna). Ankaŭ en Bulgario okazis Universalaj Kongresoj en Sofio (1963) kaj Varna (1978). Okaze de la 67-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio ĉijare, mi kaj aliaj 5 samideanoj el Rumanio vizitis la kongreson. Ĉeestis ankaŭ 8 samideanoj (laŭ kongresa libro), el Serbio,



Kroatio, Makedonio kaj Danio. Kiam mi ricevis la Kongresan Libron, skribita en Esperanto, mi pensis ke la organizado estas en ordo. Sabate oni malfermis la kongreson en la kunvenejo de la Urba Domo. Por ni, eksterlandaj samideanoj okazis malbona surprizo. Kial? Dum la kongresa kunveno oni parolis nur en la bulgara lingvo. Ankaŭ la afiŝo kun la kongresa programo estis skribita en la bulgara lingvo. Bedaŭrinde, oni ŝanĝis la programon kaj informojn pri tio oni donis nur en la bulgara lingvo. Ni pensis ke ni vizitos la koncerton kun la partopreno de la geaktoroj de

Bulgara Esperanto-Teatro (kompreneble en lingvo Esperanto), anoncita en kongresa programo. Granda iluzio! Ankaŭ la aktoroj legis ion en bulgara lingvo. Pri la senhonta konduto, la estraro de Bulgara Esperanto-Asocio ofendis ne nur min, sed ankaŭ aliajn eksterlandajn samideanojn kaj la principojn de la internacia lingvo Esperanto. Eble, la komitatanoj de Bulgara Esperanto-Asocio forgesis la Deklaracion pri Esperantismo.

La Deklaracio pri Esperantismo, akceptita de nia Unua Universala Kongreso (jaro 1905): La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzado de lingvo neŭtrale homa, kiu “ne entrudante sin en la internan vivon de popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn” donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Efika laboro por Esperanto devas tion ĉiam atenti. Propagandistoj de Esperanto devus antaŭ ĉio konsciiĝi, ke venko de Esperanto proksimiĝas tiom, kiom multiĝas ĝia bezono kaj ebleco

ĝin apliki. Do, ne sufiĉas nur propaganda laboro por Esperanto. Simpla afero lingva, simpla studado de la lingvo, plibonigado, pliriĉigado kaj plilogikado de ĝiaj gramatiko kaj vortaro. Tio estas nur malgranda parto de la poresperanta laboro. La ĉefa parto de la laboro estas uzi la lingvon praktike, kaj ebligi ĝian uzon. Kiel povas helpi disvastigon de la lingvo internacia tiuj homoj, kiuj mem prenos for de si la povon uzi la lingvon? Mi dezirus scii la opinion de la estraro de UEA, kie Bulgara Esperanto-Asocio estas membro.

Marian Vochin

SEMINARIO PRI NOVAJ KOMPUTILAJ KAJ INTERRETAJ RIMEDOJ POR E-INSTRUISTOJ

Inter 08-12. de aprilo okazis en Budapeŝto internacia trejna seminario pri novaj komputilaj kaj interretaj rimedoj, uzeblaj / uzindaj de Esperanto-instruistoj. Inter la traktitaj temoj estis ekzemple manaĝado-sistemo por interretaj kursoj, aŭtomatigo de priservado de klientoj kaj tele-kursoj, reklamado en Facebook kaj AdWords, komunikado inter individuoj kaj grupoj - kanaloj kaj metodoj, grupa laboro per nubaj metodoj, karaktero-rekonaj programoj por Esperantaj dokumentoj, senpagaj programoj el la nuboj, sen instalado ktp.

La seminarion gvidis Szilvási László, gvidanto de Lingvo-Studio ĉe Eventoj en Budapeŝto. La seminario okazis en kadre de EU-financita kunlabora projekto por Interkultura Centro Herzberg (DE) kaj Centro pri Interkultura Edukado en Nowy Sącz (PL) - kun la ĉeftemo: strategioj por internacia kunlaboro en la kampo de plenkreskula edukado. La fakan seminarian programon kompletigis urborigardadoj, ekskursoj kaj vesperaj esperantistaj programoj.

Szilvási László

INTERNACIA AMIKA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN SLOVENIO

Esperantista klubo de Posavje en slovena urbeto Brežice organizas la Renkontiĝon la 25-an de julio por ĉefe najbarlandaj esperantistoj (kroatoj, italoj, aŭstroj, hungaroj) kaj esperas ke la renkontiĝo instigos la najbarajn esperantistojn al pli ofta kaj pli efika kunlaborado. La ĉeftemo de la renkontiĝo estas: Regiona kunlaboro inter Esperantistaj societoj.

Anton Mihelič

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de majo 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jozefo Reinvar, Zsófia Kóródy, Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Anonio del Barrio, Maria Zocato, Sandra Schweder, Spomenka Štimec, Marian Vochin, Szilvási László, Anton Mihelič.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

